# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 ∈. Familia: 70 ∈.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO/MARTO 2018** **Nro. 114 (1/18)**




*Ni rigardis malantaŭen kaj trovis tiun-ĉi propagandafiŝon pri E-kurso en nia sidejo. Ĝi taŭgas por rememorigi vin ĉiujn pri la komenco de nova kurso ĉe nia sidejo. Ĝi estas gvidata de David Redondo kaj disvolviĝas ĉiuvendrede, de la 19:30 ĝis la 21:00 h. Se vi deziras refreŝigi viajn konojn pri Esperanto, ĉeestu ĝin kaj trovu novajn geamikojn kun kiuj interparoli en la internacia lingvo.*

**LOKE ...**

## Z-FESTOTAGO.

Kiel anoncite, la 16an de decembro ni kuniĝis ĉe nia sidejo, same kiel tradicie okazas laŭlonge de la tuta mondo, por kunmemori la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhoj.



Post parolado de Jesús M. García pri la historio de Esperanto en Bizkajo kaj sekva debato, oni okazigis surbrustigon de verdaj steloj kaj donacon de libroj al gelernantoj de la lasta kurso, kun tre specialan kaj koran dankon al la instruisto, nia entuziasma amiko David. Por fini, ni ĉiuj kuniĝis ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

Gaja kaj vigla etoso ŝvebis sur niaj kapoj dum la tuta renkontiĝo kaj dum oni planis ambiciajn agadojn por la nova jaro ĵus komenconta.



## KRISTNASKA LOTERIO.



Esperanto-Grupo
www.esperanto.net
Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO
Nacia Loterio N° 03.382
La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2017.
4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €)
0001
En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.
Servalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea

La pasintan jaron ni sukcesis ricevi premion en la kristnaska loterio, sed ĉi-jare ni revenis al nia kutima malbonan ŝancon.

Do, nur restas diri la tradician frazon "gravas ke ni bonfartas" kaj atendí ĝis la venonta jaro, kiam certe bonsorto trafos nin denove.

## LA PREZIDANTO DE HEF EN BILBAO.

La 17an de januaro vizitis nin la prezidanto de HEF, Toño del Barrio, kiu veturis en Bilbaon pro personaj kialoj. Inter aliaj demarŝoj, estis tempo por rendevui kun nia kara amiko Eduardo Larrouy, tiel kiel atestas la apudaj fotoj.





## ETB EN LA E-GRUPEJO.

La 19an de januaro, trihoma skipo el ETB (“Euskal Televista”-“Vaska Televido”) vizitis nian E-Grupejon por fari raportofilmon pri Esperanto kaj pri la Grupo de Bilbao.



Sur la foto, Patxi de la Hoz estas intervjuata de la televidaj ĵurnalistoj, gvidataj de Anart, ege afabla kaj simpatia intervjuanto.

Post iom longa atendado, la filmeto estis spektebla la sabaton 10an de februaro en ambaŭ kanaloj de ETB: vaske en ETB-1 kaj hispane en ETB-2. Vi povas spekti ambaŭ en nia TTT-ejo:

https://sites.google.com/site/esperantobi/home

## NOVA E-KURSO.

La 16an de februaro komencis nova E-kurso en nia sidejo, gvidata de nia nelacebla kaj entuziasma amiko David Redondo (sur la foto).



La kurso komencis kun 12 novaj gelernantoj sed, iom post iom, aliĝos al ĝi aliaj homoj: membroj de la E-rondo, kiuj deziras perfektigi siajn lingvosciojn kaj gelernantoj de la pasinta kurso.

Kompreneble, la kurso estas malfermata al ĉiuj niaj asocianoj, kiuj krom rememori pri siaj E-konoj ankaŭ povas helpi al la novaj kursanoj en la lernado de la lingvo.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**30 mar-06 apr. 2018**. <u>11-a MEZORIENTA ESPERANTO-KUNVENO</u>. MARAKEŜO (MAROKO). Aliĝoj kaj informoj ĉe: mezorienta.kunveno@esperanto.org aŭ ĉe <u>http://uea.org/vikio/La_dekunua_Mezorienta_Kunveno_en_Marakesho,_Maroko</u> Ĝenerala temo: Esperanto en Norda Afriko

**20-22 jul. 2018**. <u>77-a kongreso de Hispana E-Federacio</u>. Madrido. Interesa programo kaj malmultekostaj tranoktejoj.

**21 – 28 jul. 2018.** <u>51-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)</u> - en Madrido. Kongresa temo "La kultura heredaĵo de Esperanto". El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo, karavana transiro al UK en Lisbono.

**28 jul-04 aŭg. 2018**. <u>103-a Universala kongreso</u> en Lisbono (Portugalio).

**04-11 aŭg. 2018**. <u>Internacia Junulara Kongreso (IJK)</u> de TEJO, en Badajoz. Ne nur por gejunuloj.

**05-12 aŭg. 2018**. <u>SAT-kongreso</u> - en Kragujevac, Serbio. Ĉeftemo: Esperanto kaj transnacia komunikado en la inform-teknologia epoko. Riĉa faka, kultura kaj turisma programo. Ĉefprizorgantoj: Saša PILIPOVIĆ kaj Radojica PETROVIĆ

**Kompleta kalendaro pri E-eventoj, okazintaj kaj okazontaj, en:**
**http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm**

## HUMURAĴO.

Virino aĉetas vestaĵo-ŝrankon ĉe IKEA, portas ĝin hejmen kaj muntas en la dormĉambro. Preterpasas tramo antaŭ la domo, la ŝranko komencas vibri kaj disfalas. Ŝi remuntas la ŝrankon, sed dum la venonta preterpaso de la tramo denove la ŝranko disfalas. Ŝi do decidas alvoki ĉe IKEA kaj mendi teknikiston por munti la ŝrankon.

Venas la teknikisto kaj denove muntas la ŝrankon, tute zorge. Fine li eniras la ŝrankon por iomete subteni la bretojn, kaze ke la venontatramo denove vibrigos la ŝrankon kaj disfaligos ĝin - ja ne damaĝiĝu la bretoj. Tiumomente hejmenvenas la edzo de la virino, eniras la dormĉambron, vidas la teknikiston de IKEA en la ŝranko kaj tuj demandas:

- "Kion vi faras tie ĉi?"
- "Nu", respondas la teknikisto, "vi certe ne kredos ĝin, sed mi atendas la tramon."

(*Lu Wunsch-Rolshoven*)

**H.E.F.**

## KIAL NE ALIĜI AL HISPANA E-FEDERACIO (HEF)?

Komenciĝis jam la jaro 2018, kaj do, se vi pensas ke vi nun emas helpi al HEF plenumi ĉiujn ĝiajn laborojn, eble estas la bona momento aliĝi al nia asocio.

Se vi ne estas konvinkita, jen kelkaj kialoj por kuniĝi kun ni:
http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kial-aligi

Memoru ke ni kreis retan formularon
https://docs.google.com/forms/d/1QvzHomKs9Y5vf_z2XnH88Da9gQP_rxvPXAddQPsprMQ/

Ankaŭ eblas plenigi la paperan formularon por la jaro 2018, kiun vi trovos en nia retejo en formato pdf.
http://www.esperanto.es/hef/images/PDF/HEF-ALIGHILO.pdf

Ne dubu! Ni estas neprofitcela asocio, kiu apenaŭ ricevas eksterajn helpojn, kaj nur dependas de niaj anoj por antaŭenigi Esperanton en nia lando. Ni bezonas vian kunlaboron. Estu bonvena!

Se vi havas dubojn, vi povas skribi al la administra adreso de la Federacio: admin@esperanto.es. Por aferoj rilataj al kotizoj, same se vi estas nova aŭ jam veterana membro, memoru ke estas specifa adreso por la kasisto: financoj@esperanto.es.

Dankon kaj bonvenon!

*(José Antonio del Barrio, Presidente, Federación Española de Esperanto (HEF))*


## KURSO DE ESPERANTO EN UNED.

Antaŭ unu semajno kunvenis Manolo Pancorbo, Félix kaj mi mem kun la respondeculoj de UNED kiuj deziras organizi kursojn pri Esperanto je distanco (konkrete, centro CUID, kiu ne estas ekzakte UNED, sed pli-malpli).

La afero marŝas tre serioze. Ili volas prezenti la proponon al la Rektorejo, kaj pretas kunvoki la kurson. Por tio, ni devus subskribi dokumenton kun CUID, ĉar ni estus la instanco kiu subtenas la kurson, por doni ian oficialecon. Ili elektos la instruiston, kiu zorgos pri pretigado de la instrumaterialo. Oni faros malferman kunvokon, en kiu ni povus kontribui.

Poste, ili pagos al ni parton de la lernokostoj, kaj ni pagos al la instruisto. La modelo samas al tiu, kiun ili havas kun la asocio por la hispana lingvosigno. Ankoraŭ oni devas sendi al ni konkretaĵojn sed la afero aspektas promesplena.

*(José Antonio del Barrio, HEF-Prezidanto. 04/12/2017)*




## NOVA E-GRUPO.

Profitante la Z-tagon, la 15an de decembro estis prezentata la plej nova E-Grupo en Guardamar del Segura (Provinco: Alikanto). Ni bonvenigas ĝin kaj deziras sukcesan estontan laboron.

## 2018, JARO DE ESPERANTISTAJ RENKONTOJ EN LA IBERIA DUONINSULO

Komenciĝas nova jaro, kiu karakteriziĝos per abundo de internaciaj renkontoj de Esperanto en la Iberia Duoninsulo.

Se jam dum ĉiuj jaroj eblas ĝui la etoson de Esperanto per diversaj aktivadoj, 2018 estos speciala en tiu ĉi mondoparto: Universala Kongreso en Lisbono; Hispana kaj ILEI-kongreso en Madrido; Internacia Junulara Kongreso en Badajoz. Ne mankos ŝancoj por ĝui Esperanton en la suda Eŭropo.

Vidu pliajn detalojn en nia retejo kaj en la sekvaj informoj:

### PROGRESAS LA PRETIGO DE LA KONGRESOJ EN JULIO EN MADRIDO

En nia retejo oni jam publikigis la unuajn informojn pri la du renkontiĝoj okazontaj dum tiu ĉi somero en Madrido: la Hispana Kongreso de Esperanto (20 - 22 de julio) kaj la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21 - 28 de julio).

La kongresoj havos sian sidejon en la studenta rezidejo *Teresa de Jesús*, ene de la komplekso de rezidejoj (t.n. Colegios Mayores) de la Universitato Complutense de Madrido. Parto de la aktivadoj de la Kongreso de ILEI disvolviĝos en la sidejo de la Fakultato de Filologio de la UNED (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado).

Ni baldaŭ publikigos pliajn informojn pri loĝado kaj aliaj praktikaj informoj. Dume, se vi havas dubojn, vi povas kontakti kun la Organiza Komitato en tiu ĉi adreso: kongreso2018@esperanto.es.

### BONA PROGRESO ANKAŬ DE LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BADAJOZ.

Fine de januaro finiĝis la unua aliĝperiodo por la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ekstremadura urbo Badaĥozo (Badajoz), tuj apud la portugala landlimo, kaj do plej oportune por veni post la Universala Kongreso en Lisbono. La ĝisnuna rezulto estas ke jam rezervis sian partoprenon pli ol 90 homoj el kvar kontinentoj.

La aktivaĵoj okazos en la Universitata Rezidejo RUCAB, kie ankaŭ eblos gasti kaj manĝi.

En januaro la lokaj organizantoj kunvenis kun diversaj aŭtoritatoj. Nia samideano Carlos Pesquera estis intervjuata en programo de la regiona radio "Radio Extremadura". Ni kuraĝigas vin partopreni, kaj, se vi estas juna, ankaŭ kunlabori en la organizado. Vi povas kontakti nin per la adresoj listigataj en tiu ĉi retejo: http://ijk2018.tejo.org/kontaktoj/.

*("La Bitbulteno" de HEF, Numero 43. Feb. 2018)*

# TRA LA MONDO …

## Esperanto aŭdiĝas en UNESKO.

Mi feliĉas informi vin, ke ĝuste nun okazas oficiala ceremonio en la salono IIa de UNESKO-sidejo en Parizo.

Ĝin ebligis la pola delegacio kaj ĝia moŝta konstanta delegito, Krystyna Żurek, kun rango de ambasadoro. UEA estas reprezentata de sia vicprezidanto Stefan MacGill. Inter la aliaj gravuloj troviĝas la nepo de Zamenhof, lia filino Margaret, kaj ties filo Pierre. Ĉeestas ankaŭ pli ol 140 aliĝintoj (25% da neesperantistoj).

Jen resumo de la prelegoj: https://esperanto-france.org/jaro-zamenhof

Ili estas ĉu en Esperanto, ĉu en la franca, kun interpretado en angla, franca kaj Esperanto, dank'al profesiaj esperantistoj.

Novaĵo aperis dum la enkondukaj vortoj. Renée Triolle, ĉefdelegito de UEA, Neregistara Organizo en konsultaj rilatoj kun UNESKO, laŭtlegis salutvortojn de la direktoro de monda patrimonio en UNESKO, kiujn ŝi verkis en Esperanto, kiun ŝi lernis denaske.


*(Didier Loison. 11/12/2017)*

## Unesko permesas al *Kuriero* en Esperanto aperigi reklamon.

Feliĉe Unesko finfine permesas al *Unesko-Kuriero* en Esperanto aperigi reklamon sur apartaj internaj paĝoj en *Kuriero*, sen tuŝi la originalajn paĝojn kaj la kovrilojn, ekde la jaro 2018. Tio signifas ke ni povas havi financajn rimedojn por daŭirigi la eldonadon kaj ke la legantoj povas subteni la eldonadon per siaj anoncoj. La prezo de la reklamo samas kun tiu de la revuo *Esperanto*. Jen la anonctarifo: €1000 por 1 P.; €550 por ½ P.; €300 por ¼ P.; €165 por 1/8 P. kaj €90 por 1/16 P. Movada rabato 50%. Rabato por tuja ripeto 20%. Anoncetoj: €1 por ĉiu vorto. Mendu ĉe la redakcio de *Kuriero* <*trezoro@qq.com*>.

*(Trezoro Huang Yinbao. 14/01/2018)*

## MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO.



Sube ligilo al pdf (libere elsxutebla): MemorLibro pri Z-Jaro ... de ties iama naskigxo-datreveno (eldonita en 1960).

http://novajhoj.weebly.com/uploads/8/2/9/5/8295099/memorlibro_pri_la_zamenhof-jaro.pdf

Mi trovis tion, inter aliaj interesaj (af)eroj, en: Libroj en Esperanto

*(Lorenzo N. 14/02/2018)*

## Esperantista filmo en la Soloturna Filmfestivalo!

La Soloturna Filmvestivalo (tio estas la plej renoma svisa filmfestivalo) ĉi-vespere malfermiĝos per esperantista filmo pri Parzival'!https://vimeo.com/233639477

*(Didi Weidmann. 26/01/2018)*

# AGADO ĈE U.N.

Ĉi-sabate, la 26an de januaro, UN markos sian internacian Tagon de Memoro pri la Holokausto. Ni pretigis deklaron, kiun ni transdonos al UN okaze de tiu Memortago. Cetere, temas pri la sepdeka datreveno de la fama poemo de Leen Deij, esperantista poeto, kiu en 1948 esprimis sentojn kiuj rilatas al ĉiuj gentoj kaj ĉiuj religioj.

*(Humphrey Tonkin. 24/01/2018)*

## Al la juda foririnto

Li fermis la kofron, manpremis – adiaŭ!
Sen ia protesto li iris… Hodiaŭ
mi tion komprenas; li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kun kapo klinita la kofron li portis.
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis
sen ia protesto… Li povis nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kaj iam la filo kun filo parolos,
kaj tiu demandos, la veron li volos.
La mia silentos… kaj povos nur miri,
ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.
Sed Auschwitz *ekzistis*! Nu, kion plu diri?
Ke mi kaj ke vi… ni lin lasis foriri.

---

## E-HUMURAĴO

